

BOLETIM INFORMATIVO DA
ASSOCIAÇÃO PORTUGUESA
DE ESPERANTO

NIA BULTENO



INFORMA BULTENO DE

Rua Dr. João Couto, 1238 r/c. - A Tel. 74 13 59 LISBOA 4

AUGUSTO — SEPTEMBRO

N.º 15

ESPERANTO — MENSAGEM DE PAZ

Prelego de Alsácia Fontes
Machado okaze de la V-a Renk-
ontiĝo en Caldas da Rainha la
26-an de Junio 1977.

No dia 1 deste mês comemorou-se internacionalmente o Dia Mundial da Criança. Numa das emissões desse dia da Radiodifusão Portuguesa ouvi, inesquecivelmente, uma vozita de criança, com bastante personalidade, que, entre outras cousas, repetiu várias vezes: - Nós não queremos a guerra! Queremos que toda a gente seja amiga uma da outra.

Por entre as respostas que a vozita clara e firme ia dando às perguntas que o locutor lhe fazia, aquelas palavras "nós não queremos a guerra! queremos que toda a gente seja amiga", surgiram repetidamente, traduzindo com nitidez a preocupação que ensombrava aquele espírito de criança, que falava no plural, interpretando o sentir de todas as crianças. Foram, ao mesmo tempo, um apelo de Paz e de Amor como aspiração absoluta de todas as crianças, Paz e Amor -dois elementos indispensáveis para o desenvolvimento correcto e harmonioso de uma criança, sabêmo-lo nós, com os nossos conhecimentos de adultos e a sabedoria dos livros, mas acentuado na voz de uma criança, no plural, com um significado espantoso. Principalmente porque aque-

21a criança estava manifestando uma repulsa intuitiva por um mal que ela nunca vira e que só teoricamente podia conhecer. "Nós não queremos a guerra!" quando uma criança produz tal afirmação, significa que a mais forte aspiração dos povos e das nações, para se realizarem, é a PAZ, irmã gêmea do AMOR ou sua consequência natural.

Ora a Paz e o Amor são a ideia básica sobre a qual o autor do Esperanto fundou a sua criação. Analisando o comportamento das gentes na sua própria pátria, Zamenhof, o autor do Esperanto, apercebeu-se de que a língua é um factor importante nas relações dos homens e no condicionamento da sua compreensão e das suas decisões mútuas. De facto, quando fora do nosso país ouvimos um linguajar estranho, que não entendemos, o menos que podemos sentir-nos é constrangidos, isolados, à mercê do desconhecido, frustrados, digamos inferiorizados. E se alguém articula, perto de nós, a nossa língua defeituosamente, também não nos agrada a sensação.

Foi, pois com um sentido profundamente humano, como uma espécie de necessidade inata de ajudar, de contribuir para a intercompreensão e união dos homens, que Zamenhof, desde muito jovem, pensou num instrumento linguístico simples, acessível aos homens de todas as latitudes, em que todos pudessem exprimir uns aos outros os seus pensamentos, as suas concepções e entre si transmitir os seus sentimentos e os seus anseios. Se todos pudessem comunicar entre si, de raça para raça, de país para país, verificariam que as diferenças existentes de uns para os outros, são mínimas e que tanto os seus desejos como as suas necessidades, os seus problemas e as suas dificuldades pouco variam, tornando-os analogos como habitantes do mesmo planeta, como seres vivos que são, receptivos a todos os extremos da vida, à dor como à alegria, limitados nas suas possibilidades e nas suas realizações, prisioneiros da sua própria condição.

Através de toda a maravilhosa mecânica do Esperanto, através de toda a obra literária do seu criador e do transparente espelho do seu pensamento sempe igual que ela constitui, através da sua própria vida e dos diversos factos que revelam o seu temperamento, podemos concluir, sem temor de errar, que o Esperanto é a generosa concepção de um grande espírito e duma excepcional inteligência amoravel, foi o gesto espontâneo de amor de um Homem bom para todos os homens.

Feliĉo

Estas ne senti la malvarmon
sur nia korpo ĝis kiam ĝi fariĝos violkolora
en vintro.

Feliĉo

Estas ne manĝi la maizpanon ŝimitan
aŭ vidi la teleron malpleniĝi rapide.

Feliĉo

Estas ne ricevi batadon de la patrino
se ni laboras maldiligente.

Feliĉo

Estas posedi domon sen truoj
kaj moletan liton.

Feliĉo

Estas povi plu lerni de post la elementa lernejo.

Feliĉo

Estas gajni salajron
kaj vizitadi kurson.

Feliĉo

Estas la patro ne bati la patrinon
kiam li ebrigas sin.

Feliĉo

Estas havi bulojn por ludi.

Feliĉo

Estas ne plori.

Feliĉo

Estas ricevi donacon en la kristnaska vespero aŭ en la
naskiĝotago.

Feliĉo

Estas povi aĉeti medicinojn
por la gefraĉjoj kiam ili malsaniĝas.

Por mi

Feliĉo

estas morti...

Kaj vi,
kiam havos
ĉion ĉi, kion mi ne havas
jen vi estos Feliĉa!

Poeziaĵo originale verkita
de
MARIA ISABEL ALVES SERRA
(dekjara knabino)

Esperantigis
Eduardo Novembro

Si batalis en la kadro de germana socialista partio por la liberigo de l'amasoj, sed neniam forgesis la polan laboristaron.

Kun la transformiĝo de la burĝaro en la kapitalismon, kreskis kontraŭstare sindikata burokrataro paralele al ŝtata burokrataro.

Roza por impulso de sia revolucia spirito batalis tiom la burĝan burokrataron, kiom la sindikajan.

Ripetfoje ŝi reprenis la komunistan manifeston por ĝin denove pristudi kaj asimili ĝian spiriton. Al tiuj ĉi sek vantaj du veroj ŝi ligis sin dogme: "Unue la absolutaj malsamecoj de interesoj ekzistantaj inter proletaro kaj posedanta klaso en unu Lando kaj due la absoluta sameco de interesoj (interskomuneco) inter proletaro de ĉiuj landoj". Ŝi aldonis: "Ni dankas, krom Marks kaj Engels mem, antaŭ ĉio al tiuj el iliaj lernantoj, kiuj penadis evoluigi la marksismon, ne ellasante al ĝi fremdajn elementojn".

Ŝi ligiĝis al la super menciitaj veroj mense kaj kore. Ili estis finfine la pli malfrua koncepto de Trotsky: "Ne eblas konstrui socialismon en unu sola Lando; la revolucio estu daŭrigenda ĉien ĝis la finvenko de la tutmonda laborista klaso".

Iam JAŭres intuicie komprenis tiun principor kaj en la lastaj tagoj de lia fervora vivo agis laŭ ĝi.

Al Marks kaj Engels kaj iliaj lernantoj tiaj, kiaj Lafargue, Kautsky, Mehring, Labriola, Saks, Helfferding kaj multaj aliaj, ni devas demaskigi la iaman forte impresivan devizon: "Libero kaj egaleco". Per ĝi la burĝaj klasoj pretendis kredigi al proletaron, ke ĝia emancipo estus de finitive atingebla, sed kontraŭstarante tiun fikтивan koncepton, la feraj ekonomikaj katenoj ligigas pli kaj pli streĉe la dividitan proletaron; dividitaj per la imagaj landlimaj linioj.

El la marksaj lernantoj, R. Luksemburgo estis unu el la plej sinceraj kaj efikaj. Kompreneble, ĉiuj lernantoj de Marks kaj Engels klopodis interpreti novajn sociajn fenomenojn laŭ propra vidpunkto. En la aplikado de socialista doktrino al laborista batalo ne ĉiam iliaj ideoj kaj konceptoj kongruas unuj kun aliaj. Ekz: Gorter, Lenino kaj Roza estis ĉiuj voluntarismaj, sed dum Lenine apogis siajn estontajn agojn al iuj elitismaj kredoj, kiuj fortigas lian ĉiaman dubon al kredo, ke nur forte politikigata avangardo povus akceligi la movon al emancipiĝo de la amorfaj

kampanaj k. s. amasoj, ĉe Roza ŝia koncepto de revolu-⁵
ciaj agoj estas saturitaj de kredo je la povo de klaskons-
cio de la neklera proletaro; ĝia fido kaj kapacito por ak-
cepti konscie la marksistajn principojn, tial ke ili iras
favore al interesoj de la amasoj.

Roza ne ĉiam estis komprenata de siaj germanaj k-doj,
precipe ŝia laboro por Polio. Nur kelkaj tion faris; in-
ter ili Karl Libknecht. Lia verva sindono al socialismo
kaj lia konstanta aktiveco altiris ŝian atenton. Por la
burokratoj de la Partio, Karlo estis la konfuzitulo (Kon-
fusionrat). Li sin ĵetis fervore al novaj formoj de klas-
batalo, kiel la junulara organizo kaj anti-militista agi-
tado. Li eĉ favoras la eksigon de la proletaro el la ekle-
zio.

Krom Kaustski, la maljuna W. Libknecht ĝis sia morto ha-
vis grandan influon en la ĵurnalista kariero de Roza Luk-
semburgo ĉe "Vorwärts" kaj "Neue Zeit", Tio ĉi ankaŭ kon-
tribuis al alproksimiĝo de tiuj, en multaj punktoj, simi-
laj karakteroj: Roza Luksemburgo-Karl Libknecht.

daurigota

LA GRAVECO DE ESPERANTO FIRMIGAS

"GRAN ENCICLOPEDIA ESPASA" kastililingva, 90 voluma vo-
luma enciklopedio eldonita en Barcelono, mendis al nia Sa-
mideano Manuel de Seabra artikolon pri la originala espe-
ranta literaturo cele al aktualiga volumo publikigota pro-
ksiman jaron. Ĉi tiu artikolo estos 7500 vorta kaj enha-
vos ĉirkaŭ dek ilustraĵojn. Laŭŝajne estas la unua fojo
ke la originala esperanta literaturo estos traktata en
granda enciklopedio, kun la avantaĝo ke "Espasa" estas
"la" enciklopedio ne nur de Hispanio sed ankaŭ de Sudame-
riko.

Ni atentigas nian legantaron ke la enciklopedio estas
"kastililingva". Estus grava eraro se ni dirus ke ĝi estas
hispanlingva, ĉar ne ekzistas tia lingvo.

En Hispanio oni parolas la kastilian, la katalunan, la
baskan, la galegan... sed neniam "hispanan" lingvon.

A. P. S.

IOM PRI POLAJ ESPERANTSTOJ

(korespondajo propra)

Pollando - troviĝanta preskaŭ en la meza Eŭropo, iom norde - estas unu el la landoj sur nia kontinento, kie la lingvo Esperanto estas kaj vaste kaj sukcese disvastigata. Polaj esperantistoj membras en 120 diverslokaj rondoj, en 14 filioj de Pola Esperanto-Asocio (PEA havas ĉ. 6000 membrojn).

La agadirekto de PEA estas popularigado kaj instruado de Esperanto. Ĝi estas realigata i.a. per kursoj organizataj same de la filioj kaj rondoj kiel ankaŭ de la Ĉefa Estraro de PEA kiu gvidas landskale imponan laŭnombre kurson (ĉ. 5000 gekursantoj). Por popularigado de la lingvo, de la E-Movado servas i.a. eldonaĵoj aperintaj E-lingve kaj pole. En la periodo 1946-1976 aperis en Pollando sume pli ol 230 librotitoloj je la suma eldonkvanto ĉ. 800 mil ekz. La librojn eldonadis esperantistoj (66%) kaj ŝtataj eldonoficejoj (34%). La plimulto konsistas el lernolibroj (28 lernolibroj; 268 mil ekz.), vortaroj (15 vortaroj p-e kaj e-p; 118 mil ekz.).

La alia ĉefa direkto estas kultura agado. Estas ekzemple organizataj kaj klubaj vesperoj kaj kulturaj aranĝoj landskalaj (ekz. Kultura Seminario en Bydgoszcz, Trarigardo de Art-Esembloj en Mielno), porokazaj vesperoj, ofte kunlabore kun la funkciantaj en nia lando kulturinstitutoj de Aŭstrio, Japanio, Hungario, Bulgario k.a.

Jam ekde 18 jaroj Pola Radio Varsovio disaŭdigas E-programojn (ĉiutage trifoje po duonhoru). Ĝi bone popularigas la polan kulturon kaj la atingojn de nia nacio; same servas por disvastigado de nia movado. Ankaŭ same servas la pola gazetaro - Generale pritaksante - ne nur lokaj ĵurnaloj gvidas konstantajn E-anguletojn; de tempo al tempo publikigas artikolojn.

WALERIAN WODARCZYK

Varsovio

—daurigota— -

DONACOJ POR "NIA BULTENO"

S-ano Licinio Granada	80\$00
S-ano Eduardo Padrão	100\$00
S-ano Agostinho Silva	50\$00
S-ano Adolfo Nunes	180\$00
S-ano Carlos Alberto Leal	120\$00
S-ano Amatoro	150\$00

Distra Sinjoro

D-ro Benz estis tre distrita sinjoro. Enpensiginte li iuvespere eniris en domon, kie loĝis librovendisto. - D-ro Benz pendigis sian ĉapelon en la koridoro, eniris tu te senceremonie en la salono, kie la familio sidis, tiris seĝon al la kameno, metis siajn piedojn sur la kadron kaj enprofundiĝis en pensojn. Subite li ekvidis francan horloĝon starantan sur la kamen-rando kaj diris: "Edzino, kie vi akiris ĉi tiun novan horloĝon?" Neniu respondis, kaj neniu estis kapabla respondi, ĉar ili ne povis deteni sin ridi pri la distreco de la viro. Denove li kriis: "Edzino, kie vi akiris ĉi tiun horloĝon?" Nun la mastrino de la domo alproksimiĝis al li dirante: "D-ro Benz, vi eraras; vi eniris en la malĝustan domon." Li eksaltis, jetis rigardon al la ĉeestantaj personoj kaj sen peti pardonon li kuris el la domo. Kiam post unu horo la librovendisto eniris en la koridoron, li ekvidis la ĉapelon de D-ro Benz pendantan sur hoko, sed unu el liaj propraj estis for.

Peter Frey

WALERIAN WODARCZYK

Superas ĉiu trezoro
simpla homa koro.

Solule piediris tage
ekstaris senage.

Alia venis subite
kaj kuniris sprite.

Fore due malaperis
ambaŭ sin oferis.

Kaj bonis ilia vojo
ĉar regis la ĝojo.

Varsovio

morto 77

- Ĉu oni povas aĉeti ĉi tie ĉien, kie estas
necesa al fortepiano?

- Ho jes, certe, sinjore!

- Bonege! Tiam bonvelu deni al mi unu bonan
hakilon!

AMUZA FAKO

La vesperan kunvenon de la V-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj partoprenis 110 ĉeestantoj.

Unu el la eroj de la programo estis la ĥora kantado de popularaj kanzonoj en Esperanto, fare de junula grupo de Caldas da Rainha.

Ĉar la kantaĵoj estis tre konataj kaj belaj, ankaŭ la ĉeestantaro partoprenis, kantante ĥore kelkajn el ili.

Pere de enketo realigita oni atingis konkludojn jenajn:

45 kantis "La Krio"-n, 38 kantis "Klementino"-n kaj 36 kantis "Rosmareno"-n.

Krome oni konstatis, ke 7 kantis "La Krio"-n kaj "Klementino"-n, 8 kantis "Klementino"-n kaj "Rosmareno"-n, 5 kantis "La Krio"-n kaj "Rosmareno"-n.

Laste oni vidis, ke nur 3 kantis "Rosmareno"-n, "Klementino"-n kaj "La Krio"-n.

Ĉu vi kapablos diri al ni kiom da ĉeestantoj tute NE kantis?

Solvo de pasinta numero 14

Horizontale: 1, Eĥolalio, dorlotanto. 2, kelidonio, b,u, epikarp. 3, omegan, km, reiri, puna, e. 4, NIA,n,ĝi, lamanto, omo,ke. 5, oazo, ocimo, monerujoj. 6, maizo, enotero, melono. 7, il, batraka, humora, kaj, 8, oceano, ĵaketo, citata. 9, BULTENO, nuligi, doz, ul. 10, uro, aorto, lineo, iri, re. 11, onikso, unika, j, jogo, o. 12, janiĉaro, sent, neniaj.

DEZIRAS KORESPONDI KUN GEPORTUGALOJ

Lingvoponto

PL 119

70101 - Kupio 10 - 10 - Finlando

Amika Rondo

S. Gaston Tremon

31, str. Turgot

F-87350 - Panazol - Francio

Japana Esperanto-Instituto

Hongo 2-2-14 - Bunkyo-Ku,

Tokio - 113 - Japanio

Oni travivas popolamasan epokon, en kiu la unuopaj agoj ŝajnas esti sensignifaj. Amase ĉio venkas, eĉ la mensogo. Grave estas kunigadi amase homojn aŭ aĵojn, reripeti ĝisnaŭze... La rezulto ne prokrastiĝas. Inkluzive la plej sensencaj.

Pro tia kvazaŭa mistiko, movadoj kia esperantismo stagas ĉe ni. La plej kuragaĵ samideanoj malkuraĝiĝas, ĉar ili sentas la malplenoŝ ĉirkaŭ si...

Tamen estas esceptoj kiuj atestas nun kaj ĉi tie la taŭgecon de la individua agado. Sen ia persona kulto, mi rimarkigas la ekzemplon al ĉiuj ni donitan de A.N. en Caldas da Rainha, kie li vigle kaj entuziasme distingigis.

Alia rimarkinda pruvo devenis de la juna kaj nova samideano Pinguinha, kiu preskaŭ sola kuraĝe akceptis la inviton de nia Asocio por okazi en lia adopta urbo la V-an Renkontiĝon. Sendube li fidis je la agado de la estraro de PEA, kiu fakte multe helpis, tamen sen lia volo la afero ne estus ebla.

Do, samideanaro, ĉiuj ni, eĉ la plej izola, la plej modesta, la plej nekonata havas rolon en nia movado. La homa volo ne estas literaturaĵo.

Mi kredas, ke ĉiuj esperantistoj kiuj respondis al invito de nia Asocio kaj ĉeestis la V-an Renkontiĝon en Caldas da Rainha forlasis tiun malgrandan urben kontentaj, kiel okazis pasintan jaron post la IV-a en Lisbono.

La renkonteĵo estis bone lekita, ĉe angulo de la bela parko, kies ombron mi ne povis ĝui pro la postulo de la programe, el kiu ni ne volis perdi eĉ peceten.

La programe, kvankam ne ĉiam rigore plenumita koncerne al hortabelo, entenis la kutimajn erojn, el kiuj mi reliefigas la partoprenadon de la malgrandaj kantoroj kaj de la junaj muzikludantoj, kies regiŝorojn mi kore laŭdas.

¹⁰ La ekskurso estis tre interesa, precipe la pasade tra Foz do Arelho-n, kie mi restus homojn ĝuante la nekonitan spektaklon kaj gustumante la multegen da moluskoj...

Belega estis la vizito al Muzeo José Malhoa kies cambrojn plenajn da artaĵoj mi trapasis avide. Al ĝi tre helpis la gvidando.

Pro frua ferire mi aŭdis nur la legadon de la letere de s-ano Dr Vaz Velhe (kiun oportune mi intencas komenti), la partoprenon de nia kara Adolfo Nunes kaj la malmultajn parolojn de la membroj de la Organiza Komitato.

Bedaŭrinde mi ne povis ĉeesti la lastan parton de la programe, en kiu partoprenis aliaj kleraj gesamideanoj.

Malgraŭ tio mi forlasis Caldas da Rainha-n konvinkita, ke Esperanto ne malaperas inter ni.

J. C.



MALPURA MEDIO KAUZAS DUONAN DE LA KACERMORTOJ

Pli el duone de la mertoj pro kancero en la evoluinta mondo estas sekve de la media malpurigo, laŭ la nuna scio. Tien deklaris s-ro Mestafa J. Tolba, direktore de la Media Programo De UN en Nairobi, en la vespere antaŭ la ĉi-jara Monda Media Tago (1977-06-05). Laŭ li danĝere kuŝas en korediĝo de la ezontavele, en nitrozaj kemiaj sterkaj kaj en sekvoj kaŭzitaj de aviadiloj en altaj aerregionoj.

Sed eĉ la homoj en la riĉaj regionoj de la mondo rigardas nur en la estantecon kaj ne pensas pri la estantaj generaciej. Tamen, se oni ordigas la internacian ekonomion, atingi la solvon ne estos tre malfacile, — laŭ s-ro M.J. Tolba.

(El "UN KAJ N" n-ro 6)



70% de la 4 miliardoj da homoj sur la tero povas utiligi higieno sekuran akvon. 15% de la homare malsaniĝas jare pro perado de akvaĉo. 90% de la mortintaj suĉinfanoj en Azio kaj Afriko estus saveblaj se ili povintus akiri taŭgan trinkakvon.

En la jare 2000, la nombre de la homoj estas 6 miliardoj, sed la akvokonsumo estas 4-oble de la nuntempa. Kial? Pro plia industriigo de la mondo: per fabriki 1 tunon da ŝtalo oni uzas 90 tunojn da akvo; per unu aŭtomobile 400 tunojn da akvo. Cetere 80% de la uzita akvo iĝas akvaĉo.

UN organizis mondan konferencon pri akvo en Argentino en ĉi-jara marto.

(El "UN KAJ N" n-ro 6)

KURAGIGA PLEDO

"Mi opinias tute ne malreala la klopodon, ke estu akceptita la lingvo peranta inter la nacioj per plibonigi interkomunikado". La prezidanto de la Monda Federacio De La UN-Asocioj Simai Mihali, esprimis sian opinion favore al Esperanto por la redakcio de "Hungara Vivo" (n-ro 1977-01).

Li plue pledas per deviga instruado de Esperanto en ĉiuj lernejoj kaj formado de taŭga instruitare. Laŭ s-ro Simai, la argumentoj de esperantistoj estas sendube pripensindaj kaj ili foje debes igi statojn kaj internaciajn forumojn okupiĝi pri la afero.

Notinde estas, ke Hungara Esperanto-Asocio estas aniĝinta al la hungara UN-Asocio, kiel kelektiva membre.

(El "UN KAJ N" n-ro 6)



NIAJ KURSOJ

Perfektigan kurson de Esperanto oni inten-
cas gvidi, kun komence en la proksima Oktobro.

La leko en kiu ĝi estas realigota ankoraŭ
estas decidota, ĉu en la sidejo de APE, ĉu en
la Esperanta Sekcio de Sociedade de Lingua Por-
tuguesa, kun dufoje posemajna ofteco.

Ekde nun oni akceptas aliĝojn de interesataj
gesamideanoj.

NIA RIDETO

- Paĉjo, ĉu la serpentej havas voston?
- Certe, Joĉjo. Tio estas eĉ la sela, kion
ili havas.

La malgranda Paŭlo estas en la oficejo de
sia patro kaj legas en la leksikono. Subite li
demandas sian patron:

-Paĉjo, kion povas signifi tio: Kristoforo
Kolumbo 1446-1506?

-Kion? Nu, certe lian telefon-numeron.

- Nu jes, mi scias, ke tiu hundo ne estas
purrasa, sed ĉe la plej malgranda bruo ĝi tuj
avertas nin.

- Kiel? Ĉu ĝi komencas beji?

- Ne! Ĝi kuras sub la divanon!

(EL "LA PRAKTIKO")

Director:

D. Olga Serra Marques de Almeida

Propriedade de:

Associação Portuguesa de Esperanto

Redacção e Administração:

Rua Dr. João Couto, 1238 r/c. - A - Lisboa 4

Composto e impresso:

Furtado & Saldanha, Lda.

Rua Capitão-Mor Pedro Teixeira, 5-A

Lisboa 3

BIMENSAL